

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Heinrich Heine,  
Die Lorelei

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

Heinrich Heine,  
[Ne scias mi, kio okazis]

*El la “Libro de la kantoj”, parto “La Reveno”.*

Min kaptas malgaj' en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
si kombas harojn el or'.

Si kombas per ora kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,  
lin kaptas ve' de ekzalt'.  
Li ja la rifojn ne vidas',  
li vidas nur supren sen halt'.

...

Ich weiß nicht, was soll es bedeuten,  
daß ich so traurig bin;  
ein Märchen aus alten Zeiten,  
das kommt mir nicht aus dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es dunkelt,  
und ruhig fließt der Rhein;  
der Gipfel des Berges funkelt  
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sitzt  
dort oben wunderbar,  
ihr goldnes Geschmeide blitzet,  
sie kämmt ihr goldenes Haar.

Sie kämmt es mit goldenem Kamme,  
und singt ein Lied dabei;  
das hat eine wundersame,  
gewaltige Melodei.

Den Schiffer im kleinen Schiffe  
ergreift es mit wildem Weh;  
er schaut nicht die Felsenriffe,  
er schaut nur hinauf in die Höh.

...

Ne scias mi, kio okazis  
al mia tristema kor':  
Antikva legendo min kaptis,  
ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile  
murmuras kiel mister',  
la supron ŝonegan orumas  
sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas  
mirinda sur la montet'  
kaj sia orajo radias,<sup>4</sup>  
si logas kiel magnet'.

Si kombas la oran hararon  
abundan per ora kombil',  
kantante misteran lidon,<sup>5</sup>  
ravantan kiel sunbril'.

Šipisto en sia ŝipeto  
kaptigas per stranga dolor',  
la rifon li tute ignoras.  
atentas nur ŝin kun fervor'.

...

<sup>4</sup>En la sube menciiita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: “kaj sia orajo radias”, kun “sia” anstatau “sia”. Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

<sup>5</sup>En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto “liedon”, kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Mi kredas, ke ondoj tiras  
la ŝipon funden de l' Rejn';  
kaj tio de l' kant' eliras  
de Lorelaj-siren'.

Ich glaube, die Wellen verschlingen  
am Ende Schiffer und Kahn;  
und das hat mit ihrem Singen  
die Lorelei getan.

Mi kredas: la ondoj englutas  
<sup>6</sup>

ſipiston, ſipeton je l' fin',  
kaj kulpa pri tio nur estas  
kantado de la virin'.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.*

*Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)*

*Aus dem Werk “Buch der Lieder”, Kapitel “Die Heimkehr”, Abschnitt II. Siehe auch ein unter: [http://gutenberg.spiegel.de/?id=58x&d=11318&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=58x&d=11318&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb_found). Vidu ankaŭ: [http://www.gedichte.vu/?die\\_lorelei.html](http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html). La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon [http://www.lieder-archiv.de/die\\_lorelei-notenblatt\\_300493.html](http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html).*

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 – †1950-12-31).*

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

*Mi, Manfred Retzlaff, kopias tiun ĉi tradukon el la libreto “H. Heine - Libro de Kantoj”, eldonita en 1911 de la “Esperanto-Propaganda Instituto” (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. /Sur la frontpaĝo de la ka-jero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: “Buch der Lieder”, Abschnitt “Die Heimkehr”. - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo [http://de.wikipedia.org/wiki/Paul\\_Gottfried\\_Christaller](http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller), kun foto de li.*

---

<sup>6</sup>Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto “kredas”. Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.